



Eldonas: Cercle espérantiste de \* Abono por unu jaro : 15 FF  
l'Agenais, F 47340 LAROQUE \* \* (12 FF por Francio)  
Poŝtkonto: 3 371 74 M Bordeaux \* \* al la ĉi-apuda pĉk.  
\*\*\*\*\*

## ENHAVO

Esperanto-gramoj (Antoni Madej)	...	2
<u>Nia debato</u> : Mortpuno (II) (Nicole Déjean, Robert Pontnau, Patriko)	...	3
Pri la organizo de la E-movado (Jansebo, Suzanne, J.G.)	...	5
Kontraŭ la balota trompŝtelo (Alessandro Panerai)	...	8
Ĵus aperis... (Kribo)	...	9
<u>Nia pasintjara felietono</u> : Tra Eŭropo per fervojoj kaj esperanto (Jakelino)	...	11
SAT-broŝurservo. Vivo de "Laŭte!" (Kribo)	...	15
<u>Nia felietono</u> : Tra la mondo per biciklo (Alfa-Beta)	...	17
Oni serĉas tradukonton. Liberecana gazetaro (J.G.)	...	19

En la koloraj paĝoj (kiuj ĉi-foje estas ja same blankaj kiel la ceteraj !):

Esperanto-vivo (Strasburgo, Vaŭkluzo, Ĝirondio, Lotgaronio, Hispanio, RANEF en Oberkirch...) kun la informoj kaj raportoj senditaj de la tieaj abonant(in)oj. I/VIII

En tiu ĉi numero vi trovos relative multe da tekstoj, sed neniun ilustraĵon. Vel Ni provis "aerumi" per pli belaj titoloj, sed ja neniuj estas tie ĉi prifripita, ĉu ne ?

Antoni Madej : "ESPERANTO-GRAMOJ"

Ĉu maristo ?

Dum tuta vivo li drivis  
Tiel la vivon travivis.

La grava klarigo

La homo malsata,  
tute ne estas  
la membro eksa  
de l'asoci' SAT-a.

Mallonga daŭro

La junulina gloro  
ofte daŭras ĝis defloro.

Plaĉoj

Al unu plaĉas lia paŭto,  
al la alia lia aŭto.

La juna detektivo

Serĉas li de l'diferenco spuron  
inter agrablo kaj plezuro.

Ĉio kostas

Ne estas kareso  
sen la intereso.

E-deklinacio

Nominativo  
Genitivo  
Dativo  
Akuzativo  
Vokativo  
Ablativo  
Lokativo  
Lapennaivo.

Por pli ridi

Kiu al ĉiu fidas,  
tiu malofte ridas.

## NIA DEBATO

# MORTPUNO

(2a parto)

Ĉ

iutage nia socio mortpunas...

\*\*\*\*\*

Mi ne havas tempon nek emon debati dum paĝoj kaj paĝoj pri "mortpuno". Certe la temo estas laŭmoda, tamen la debato estas grava kaj povas plikonsciigi al ni la konceptojn : krimo, viktimo, puno, i.a.

Kio estas mortpuno ? Tuj oni pensas pri jura decido mortigi krimulojn por protekti la socion, eviti kromajn viktimojn. Sed ĉu tiun verdikton rajtas doni kelkaj personoj ? Ĉu tiuj ĉi personoj estas sufiĉe justaj, senpasiaj, honestaj, por disponi pri tiu terura potenco ?

Mortpuno estas verdikto neinvertigebla, kvankam juĝa eraro eblas. Mortpuno estas pruvo, ĉu de socia senpovo, de socia malvenko (la socio ne kapablas respondi, zorgi pri kio ĝenas ĝin, pri kion ĝi naskas), ĉu de totalisma, kruela socio, kiu sen skrupulo, eliminis ĉion kaj ĉiun ĝenan. Ĉu mortpuno malhelpas pliajn krimojn ? Buĉadojn ?

Male, ŝajnas, ke nia granda civilizacio naskas multe da formoj de mortpuno aŭ pli ĝuste de murdoj, ĉiam pli multaj kaj subtilaj. Paradokse, ju pli teruraj, ju pli inteligentaj estas la krimoj, des pli trankvilaj, des pli potencaj estas la krimuloj, ĉar laŭleĝe ili ne estas krimoj nek krimuloj. Jen kelkaj ekzemploj :

Laŭleĝe ne estas krimoj kiam beboj mortas pro medikamentoj aŭ talko, kiam vojaĝantoj per aŭtomobiloj mortas pro mal-sekuraj veturiloj, kiam gelernantoj brulmortas pro danĝera konstruaĵo lerneja, kiam laboristoj mortas pro danĝera laboro, kiam miloj kaj miloj da personoj malesperas en aĉaj domegoj, en premaj taskoj, kiam pro profitemo estas "nigra tajdo", kiam oni mortigas en policistservo aŭ militista servo, kiam informiloj mensogas, dezirante mortigi ĉian formon de kritikpovo, kiam... longa, terura estas la listo!

Sed laŭleĝe estas krimoj, kiam viktimoj de la miraĝoj de la moderna vivo imitas siajn ĉefrolulojn, aŭ iĝas krimuloj pro tro da mizero (materia aŭ mensa), pro tro da fraŭdiĝo, kiam mensa malsanulo, kiam senesperulo mortigas.

Ĉiutage nia socio mortpunas ne nur homojn, sed vegetaĵojn kaj bestojn ; ne nur fizike sed mense.

Tiom longe dum ni akceptos tiun socion, ne utilos deklari: "Mi ne aprobas mortpunon !"

Pli-malpli konscie ni eltenas kaj kelkfoje deziras, ke regu teruraj krimuloj. Ni forlasas al ĉiuj ajn specialistoj nian sorton, ni fidas al policistaj kaj militistaj "protektoj".

Rifuzi ĉiun formon de murdoj (inter ili mortpunon) estas rifuzi la nuntempan socian "ordon", kaj provi starigi socion el individuoj pli responsaj, pli memstaraj, socion pli justan....

Nicole Déjean.

**S**tarigi pli justan sociordon, sed kiel ?  
\*\*\*\*\*

Ankaŭ al mi ŝajnas, ke mortpuno, almenaŭ en nia mondparto kaj nia socio, estas tute nepravigebla. Ununuraj argumentoj por la mortpuno, povus esti ĝia sociologia efiko, kiun mi ege pridubas, kvankam mi ne citas tie ĉi precizajn statistikojn.

Mi denove substrekos, ke ĝi tutcerte estas kondamnenda kaj malaperigenda. Mi opinias, ke ĉiuj debatontoj samopinios, kiam mi ripetos miavice, ke ekzistas multe pli oftaj formoj de mortigado kaj multe pli teruraj mortigiloj ol gilotino. Mi ne deziras ripeti la liston ĵus faritan de Nicole, kiun (la liston!)\*ni cetere facile povus pliampleksigi kaj ĝisdatigi.

Jes, ŝi prave konkludas, ke por malaperigi tiujn krimojn, ni devas starigi pli justan sociordon. Ĉio ĉi evidentas, tamen, kiel starigi ĝin ?

Jen alia diskuttemo, ankaŭ ne nova. Verŝajne multos opinioj kaj proponoj. Unuj vidos solvon en la tuja ŝanĝo de la ŝtata naturo (ĉu vere la ĝisnunaj provoj estigis ĉian progreson ?), aliaj per malaperigo de la ŝtato mem (ĉu tio vere sukcesis en iu ajn mondparto ?), aliaj en interna

\* La parentezojn kulpas la red.

plibonigo de l' homo per meditado, religio (ofte ligita kun socia agado). Persone mi ne pli tro kredas je radikalaj ŝanĝoj, ĉar ĝis nun, mi scie, radikala neniigo de sociordo ne estigis pli bonan sociordon, ofte eĉ ne malsimilan. Historiaj ekzemploj abundas, mi citu i.a. la marksismajn eksperimentojn, la nunan Iranon, kie je la nomo de malamo al la falinta diktatoro oni mortigas kurdojn, persekutas bahaanojn, ktp... Sed ni deflankiĝas de nia origina debato. Kial ne debati pri tiu problemo en venonta cirkulanta letero ?

Robert PONTNAU.

**M**ortpuni ? Kial ne ?  
\*\*\*\*\*

Mi jam multfoje mem kondamnis homojn (principe politikistojn, juĝistojn kaj bankistojn) al mortpuno, ja bedaŭrante ne potenci apliki la verdikton...  
Patriko.

\*\*\*\*\*  
Post tiu iom abrupta fino de la debato, jen la unuaj kontribuoj pri alia, enkondukita de Ĵansebo : (\*)

PRI LA ORGANIZO DE  
LA ESPERANTO - MOVADO

Argumentoj por la unuiĝo de la E-movado :

- por multaj, malpli da kotizoj.
- pli bona organizado.
- pli belaspektaj kaj regulaj revuoj, kiuj montros al la publiko, ke E ne estas la afero de kelkaj.
- pli efika agado.
- pli praktikaj servoj : libroservo, informado, propagando, adresaroj, ktp.

Argumentoj kontraŭ :

- problemoj de personoj.
- problemoj de metodo : iuj volas uzi modernajn teknikojn de propagando, la aliaj kontraŭas pro siaj principoj.

\* Pri "Mortpuno" ĵus alvenis kontribuo de "nn". En venonta n°!



- ebleco agi pli efike en iuj medioj : E-istoj povas aspekti laŭvole kiel maldekstruloj aŭ nepolitikuloj - kio povas foje esti utila.
- stimula konkuremo inter la movadoj.
- ebleco helpi E-asociojn aŭ fakojn en neneŭtraj movadoj: se E-movado estus unuigita, paraleluloj povus malfacile sin esprimi kaj organizi.

Mia konkludo :

La E-movado devas unuigi koncerne la poresperantajn agadojn. Servoj kiel informado, propagando, librovendado, adresaroj, devas esti komune organizataj.

E-gazetoj devas celi al malpli da amatorismo kaj enhavi informojn, kiuj povas interesi eĉ neesperantistojn.

E-libroj devas esti vendataj en publikaj librejoj. (Tie ofte iras esperantiĝebluloj - uf!).

E-movado devas ne aspekti kiel la Babelturo al la ĵusvarbitoj. Inter strangaj sigloj, malklaraj nuancoj, multoblaj kotizoj, ktp... la novulo ne retroviĝas. La strukturo de la E-movado devas esti klara kaj simpla.

Koncerne la peresperantajn agadojn, la nuna strukturo sufiĉe taŭgas. Neŭtra movado estas bezonata por helpi la nepolitikajn E-asociojn (havigi subvenciojn, ekzemple). Neneŭtra estas ankaŭ bezonata por naski asociojn, kiuj bezonas helpon, ĉefe en la paralelaj medioj (ekologiistoj, liberecanoj, neperfortuloj...ktp).

Tio eblas nur se la plejmulto de la E-istoj konsentas. Do je viaj argumentoj !

Jansebo.

**D**or kia rezulto ?  
\*\*\*\*\*

En la debato "Ĉu kaj kiu estonteco por Esperanto ?" mi jam respondis pri la unuigo de la E-movado. Mi aldonas : Kian rezulton donus tia miksaĵo ?... Nenion, krom fuŝaĵo.

Pri la subvencioj : Tiu oficiala monhelpo estus disdonata nur al la neŭtralaj fakoj ; ĉar, preskaŭ ĉiam, la monhelpanto estas postulema, tio okazas sur ĉiuj kampoj. Do, la neneŭtralaj fakoj havas ĉiam tiklan buĝeton. Tiam memstareco estas preferinda.

Tio, kio estus dezirenda : reciproka, lojala agado, fare de la du organizoj.

Pri la revua belaspekto : Eble, mi estas strangulo, sed mi estas (is) allogata nur pro la enhavo (t.e. la tekstoj, la esprimataj pensoj, opinioj), ne pro la belaspekto. Verdire, preskaŭ mian tutan vivon mi legis nur paralelajn gazetojn, kiuj, kompreneble, havas (is) tiklan buĝeton.

Eĉ scivolemulo pri E ne estu influata de la gazetaspekto. Eble pro mia "strangeco", kiam mi konstatis, ke en kongresoj oni uzis por la diversaj informoj ordinarajn paperfoliojn, simple tajpitajn, tio kortuŝis min, same kiel la simpleco kaj modesteco de ĉiuj kongresanoj.

E-libroj devas esti vendataj en publikaj librejoj : Ja, sed ĉu ili ne havos saman sorton, kiel la paralelaj gazetoj ?

Fine, la du organizoj kontribuas al la disvastiĝo de E, do la esperantistaro estu kontenta. La du organizoj ne konkurencu unu la alian ! Ne temas pri merkato ! Verŝajne mi maltrafas la penson de la enkondukinto.

E-gazetoj enhavu informojn, kiuj povas interesi eĉ neesperantistojn : Mi ne komprenas kial neesperantisto serĉus informojn en E-gazetoj !

Suzanne.

L a celoj malsimilas...  
\*\*\*\*\*

Unueco ! Jen la vorto, kiun oni aŭdas ĉie de la oratoroj de politikaj aŭ sindikataj kunvenoj aŭ legas en la titoloj de gazetoj aŭ flugfolioj. Sed kia estas la realeco ?

Miaj spertoj en sindikata kaj junulgasteja movadoj montris al mi, ke artefarita unueco okazanta en "historiaj momentoj" ne daŭris, ĉar baldaŭ oni vidis la plimulton provanta trudi siajn konceptojn al la malplimulto kaj rapide okazis la disrompo ofte en kolerema kaj kalumnia etoso !

Laŭ mi, oni povas unuigi nur personojn aŭ movadojn havantajn samajn celojn kaj samajn rimedojn por ilin atingi. Estas preferindaj pluraj movadoj, kiuj libere organiziĝas kaj disvolviĝas laŭ propraj celoj kaj rimedoj, ol unuigita movado, kie oni pasigas la tempon por solvi la "internajn kontraŭdirojn" !



Koncerne la E-movadojn mi opinias, ke la ekzisto de du movadoj respondas al la malsimileco de la celoj.

Ĉu esperanto nur por interŝanĝi poŝtmarkojn, bildojn, ktp...?

Ĉu esperanto ilo je la servo de la laboristoj por interŝanĝi rekte siajn spertojn kaj agadojn ?

Tamen malsimileco ne signifas devige malamikeco ! Male, estas tute eble kaj dezireble, ke la du E-asocioj kunlaboru por eldonado de vortaroj, pedagogiaj libroj, jarlibroj, ktp. Sed oni sendube povus eldoni "Kiel diri" kun la neŭtrala movado, sed verŝajne ne "La Rajto de Pigro" !

Rilate la enhavon de la E-gazetoj kulpas nur la esperantistoj mem, kiuj ofte estas nur legantoj kaj ne partoprenas en la verkado de artikoloj. Pri la disvendado de E-libroj: almenaŭ la paralelaj librejoj ĝin akceptas, sed ofte mankas la legantoj.

J.G.

\*\*\*\*\*  
\*\*\*\*\*

Kontraŭ la balota trompŝtelo

\*\*\*\*\*

Dum mi skribas ĉi tiun artikolon, hodiaŭ la 3an de junio, preskaŭ ĉiuj geitaloj iras voĉdoni. Ĉar ĉi tiuj (geplenaguloj) kiel la geŝafoj bezonas ĉiam geŝafistojn.

La Anarkia Florenca Movado afiŝis multajn sindetenistajn afiŝojn. Por mi la enhavo anarkie ne estas ĝusta. Ĉar la afiŝo diras : "Ne voĉdonu, ĉar la povo ŝtelas, la povo murdas, ĉar mankas la domoj, mankas la laboro, mankas la lernejoj, kaj tiel plu". Kiel anarkisto, kiel individuisto mi ne estas kontraŭ la povo pri la mastrumado. Se ankaŭ la povo konstruas la hospitalojn, la lernejojn, la domojn, ktp; Se ankaŭ ekzistus la "bona povo", la "honesto povo"; Mi voĉdonus neniam, ĉar mi volas nenion super mi. La unika individuo, kiu devas reprezenti min, estas mi. Mi volas decidi kiel vivi.

Krom la enhavo de la afiŝo de Anarkia Florenca Movado, por mi anarkie ne estas ĝusta la sindetenista afiŝo, ĉar tio signifas eniri en la balotan logikon. Por mi la sindetenismo de la anarkiismo estas la rekta ĉiutaga agado. Pasintjare, la 3an de junio, post la baloto la anarkista

gazetaro estis tre kontenta, ĉar plimultiĝis la sindetenismo. Min ne interesas la sindetenista partio. La sindetenismo sen la rekta agado estas nur iom da protesto pri la malbona mastrumado de la povo.

Nun mi konkludas per vetera sciigo : pluvas forte. Ĉu ankaŭ la vetero estas sindetenista ?

K-do Panerai Alessandro.

\*\*\*\*\*  
\*\*\*\*\*

Fulmotondro ! Ĉu vi legis ? Terure ! La anarkistoj (kaj eĉ la plej ĝisostaj) invadis nian bultenon... Kion fari ??? Sindeteni ? Ne. Nur la rekta agado... Al viaj globkrajonoj!

## JUS APERIS

"Mia Kredo" - Karl Marks (16 paĝoj en A6-formato). Eldonis : Esperanto Editions, 74 Saxon Road, HASTINGS TN35 5HH, Anglio. Pogranda prezo : 35 ang. pencoj. Giro 34 768 7202 (ink.afr.)

La celo de tiu broŝureto estas liveri "la plej mallongan kompletan priskribon, kiun Marks faris pri siaj fundamentaj opinioj pri la historio de la socio". La kompilinto F. Maitland elektis de Marks ekstrakton el la Enkonduko al "Kontribuo al la kritiko de la politika ekonomio" (1859) kaj de Engels ekstraktojn el diversaj leteroj (1890, 1893, 1894).

Kiu legos nur tiujn tekstojn, tiu certe ne komprenos, kial multaj kritikantoj - i.a. la liberecanoj kaj en SAT, Lanti mem - vipis la "nurekonomiismon" de Marks kaj Engels : tiuj ekstraktoj efektive povas refuti tiun ŝajne hastan kondamnon al Marks. Sed Marks mem liveris pli frue (ekzemple en sia respondo, 1847, al "Filozofio de l'Mizero" de PROUDHON) pli drastan, sennuancan vidpunkton, certe diktitan pli de la deziro per iu ajn - eĉ plej aĉa - rimedo ridindigi Proudhon, ol de la deziro trankvile argumentadi sen subtaksi la valoron de la kontraŭulo :

"...la sociaj interrilatoj estas intime ligitaj kun la produktofortoj... la brak-muelilo naskos la socion kun feŭdestro ; la vapor-muelilo la socion kun industria kapitalismo..." (Mizero de l'Filozofio, ĉap.II, §1, 2a rimarko).

La ekskompertiano Roger Garaudy, en sia libro "Appel aux vivants" (Alvoko al la vivantoj, Paris 1979), p. 318, atentigas, ke poste Marks kaj Engels faris sian "mem-kritikon" pri tiu afero, kaj ja kiel marksano, Garaudy konstatas, ke "la grandaj abruptaj ŝanĝoj en la civilizo situas plej ofte (substrekas mi) alvare de la grandaj krizoj kaj de la grandaj malkovroj pri energio".

Kvankam tiu broŝureto, pro sia eteco, ne povas multe lumigi la originon de tiu plufleganta sed, laŭ mi, eble vana debato - kaj des malpli forgesigi la strangajn rimedojn, kiujn uzis Marks kontraŭ siaj ideologiaj kontraŭuloj, ĝi estas valora dokumento sur kiu povos sin apogi la debatemuloj uzantaj la sennaciecan lingvon.

Kribo.

\*\*\*\*\*

Disko 45 T kun du originalaj kanzonoj en esperanto : "Esperanto" kaj "Estas la dua". Vendoprezo : 18 FF Rabato por revendistoj : 20%. Havebla ĉe la libroservo de SAT-Amikaro (B. Schneider, 38 av. de la République, F 94320 THIAIS, pĉk: Schneider, PARIS 22 836 36 U), kiu havas la ekskluzivecon de la disvendado.

La kanzonisto Max Roy Carrouges interpretos la kanzonon "Esperanto" en la televida elsendo "Les Jeux de 20 heures" (ĉe FR 3), vendredon 5an de septembro 1980.

\*\*\*\*\*

V. Eroŝenko : La tundro ĝemas. 84 paĝoj, 12x17,5. Eldonita de kaj mendebla ĉe Japana Esperanta Librokooperativo, Toyonaka-si, Sone-higasi 1-11-46-204, 561 Japanio.

Jen la dua kajero, same bele presita kiel la unua, de la verkoj, kiujn Eroŝenko verkis originale en esperanto. La kompilinto, MINE Yositaka, por ĝi kolektis ĉiujn tekstojn de Eroŝenko pri ĉukĉoj, popoloeto vivanta sur la tundro, en arkta Siberio. Aldone, Mine Yositaka skizis la vivon de la blinda E-pioniro. Nepre havinda !

Nia pasintjara felietono :

TRA EŬROPO per FERVOJO  
kaj ESPERANTO ...

De Slovakio al Polio tra Ĉeĥio  
\*\*\*\*\*

En Bratislava oni estis dirinta al mi kaj al sinjorino Magda, ke mi povas pagi per kronoj ĝis la ŝtatlimo, sed ke internacian bileton francino devas akiri per kapitalista mono. Laŭ la informoj pri itinero, mi devis ŝanĝi trajnon en Usti nad Orlim, veturi tra Lethorad, kaj tie atendi dum pluraj horoj, ĝis pasos la trajno al Varsovio tra Klodzko. Estas multaj ŝtatlimaj stacioj inter Ĉeĥio kaj Polio, kaj tra ĉiu pasas nur unu trajno tage (aŭ nokte). Ĉar mi volis viziti samideanon Eugeno, kiu loĝas en vilaĝeto Wambierzyce nur kvar kilometrojn de Ĉeĥio, mi devis uzi la ununuran trajnon tra Klodzko, kie Eugeno devis min atendi iom post la noktomezo. Do mi aĉetis bileton al Lethorad, kio tre malmulte kostis, ĉar en socialismaj landoj ĉiuj publikaj transportoj kostas malmulton. Senprobleme mi veturis ĝis Usti nad Orlim per komforta, bone hejtita vagono, kiu alvenis precize je la menciita horo. Mi serĉis la restoracion de la stacidomo, kaj diris al la restoraciestro en germana lingvo, ke mi deziras manĝi. Videble la restoraciestro ne mastras la lingvon de Frederike Brion (germana regnanino de la reĝo de Francio, por kiu Goethe verkis la faman poemon "Heidenröslein", dum li studis en Elzaco), sed kion povas deziri fremdulino meze de tago en restoracio ? Li alportis al mi bovidaĵon kun terpomoj, kaj mi prenis de sur la vendotablo glason da oranĝaĵo. Kiel antaŭvidite, tiu festeneto kostis al mi malmulte da kronoj. Li demandis min, ĉu mi havas dolarojn, kaj mi respondis ne, tute sincere, ĉar havis mi frankojn francajn kaj svisajn, aŭstrajn ŝilingojn kaj germanajn markojn, kiuj certe lin interesus, sed dolaron mi reale ne havis eĉ unu. Verdire, se mi havus, mi ne estus tiom stulta, ke mi pagus per dolaroj ŝanĝeblaj en Francio ion, kion mi povus akiri per neŝanĝeblaj kronoj. Do li prenis la kronojn, kaj mi eliris. Kiel diris miaj ciceroninoj en Bratislava, Usti kaj Lethorad estas tre

proksimaj stacidomoj, kaj trajnoj inter ili estas pluraj en tago. Sed mi vidis, ke ŝajne Usti estas urbo tute malgranda, ĉefe urbara. La stacidomo estis kovrita de neĝo, kaj la vetero estis malvarma, tial mi ne emis promeni, kaj atendis la unuan trajnon al Lethorad, kiu alvenis ĝustatempe.

Ankaŭ ĝustatempe mi alvenis en la stacidomo de Lethorad, kiu ne estas pli granda ol tiu de Usti nad Orlim. Mi devis konstati, ke mi estis bone inspirita, uzante la unuan trajnon al Lethorad. Mi tuj iris al la ĝiĉeto, montris mian francan pasporon kaj petis bileton al Klodzko. La biletistino respondis ion en la ĉeĥa, kaj ne donis al mi bileton. Ŝajne ŝi bone komprenis, ke mi volas iri al Klodzko, sed ŝi ne vendas internaciajn biletojn. Mi miris, ĉar estis tute klare skribite sur la tabulo, ke haltas en Lethorad la trajno al Pollando, kaj mi ne komprenis, kiel povas esti en stacidomo internacia trajno, sed ne internaciaj biletoj. Ĉar mi ne komprenas la ĉeĥan lingvon pli ol la slovakon, tio restos por mi eterna problemo. Mi supozas, ke transiro de mono estas pli malfacila de socialisma lando al alia socialisma lando, ol interne de la kapitalisma sistemo. En Bratislava, miaj gastigantinoj diris al mi, ke, ĉar Ĉeĥio estas pli riĉa lando ol Polio, la ĉeĥa-slovaka krono estas tre ŝatata de la sudetaĵ poloj, kiuj ne povas aĉeti ĝin en Pollando tiom facile, kiom mi aĉetas en Strasburgo germanajn markojn. Verŝajne pro tiuj problemoj estas malpli da internaciaj biletejoj en Ĉeĥio ol en Francio. Krome, la kontrolado ĉe ŝtatlimoj interne de la socialisma paradizo estas multe pli longa ol interne de la kapitalisma infero, tiel ke dum la atendado vojaĝanto verŝajne povas akiri la mankantan internacian bileton. La biletistino skribis al mi sur papero la vorton LICHKOV, sed mi ne komprenis, kion mi devas fari en tiu por mi tute ne konata ejo. Alvenis maljunulo, kiu bone parolus la germanan lingvon, se li ne suferus malsanon de la voĉkordoj. Li klarigis al mi, kion mi jam suspektis, nome, ke ne estas en Lethorad biletoj al Polio. Ankaŭ li volis, ke mi iru al tiu Lichkov, li eĉ diris al mi la germanan nomon de tiu ejo, sed mi ne estis pli informata. Ĉar mi ne aspektis pli komprenanta, li skribis al mi sur la papero, en la lingvo, en kiu verkis Kafka, ke biletoj

al Polio estas vendataj en Lichkov. Mi pensis ke, ĉar la trajno alvenos en Klodzko nur post la noktomezo, mi havas multan tempon por perdi, kaj ke, ĉar ŝajne ĉiuj ĉeĥoj volas, ke mi iru al Lichkov, ne eblas ilin kontraŭdiri. Mi aĉetis do bileton al Lichkov. Sed, ĉar la trajno estis veturonta nur post du horoj, mi eliris el la stacidomo. Mi volis lasi la valizon en fako, sed ĉiuj fakoj estis difektitaj. Junuloj frapis al la pordo de la bagaĝisto, kiu prenis mian valizon.

Elirante el la stacidomo de Lethorad, mi demandis: "Pardon monsieur, où est la poste?", sed la alparolata viro ne komprenis, tial mi demandis: "Wo ist die Post?". Post momento da pripensado, li demandis: "Pošta?", mi respondis "ja", kaj mi ne povas skribi, ke li klarigis la vojon, ĉar liaj ĉeĥaj vortoj ne estis por mi tre klaraj. Sed mi sekvis la direkton montratan de lia brako. Post momento, ĉar ne alvenis poŝtejo, mi alparolis maljunulinon: "Pardon, pošta?" Ŝi diris al mi en la ĉeĥa, kie estas la poŝtejo, mi respondis germane, ke mi ne komprenas la ĉeĥan, ŝi tradukis sian klarigon al la germana, kaj mi sukcesis kompreni, ke la poŝtejo ne estas tute proksima, sed ke la vojo al ĝi estas rekta. Do mi plu marŝis sur la neĝo, kaj fine trovis la poŝtejon.

Kvankam mi ne plu tre certis, ke mi finfine alvenos ĝis Klodzko, mi tamen volis telegrafi al Eugeno, ke mi estas alvenanta, ke li atendu min en la stacidomo, ĉar mi ne sciis, kion mi povos fari en Klodzko, se li ne estos. La du deĵorantinoj de la poŝtejo de Lethorad tute bone parolas la germanan, kio ne surprizis min, ĉar ni estis en Sudetoj. Senprobleme ili akceptis mian telegramon en Esperanto, kaj telefonis la tekston al alia poŝtejo. Kvankam ili ne parolas Esperanton, mi rimarkis, ke ili prononcas ĝin tute bone. Mi donis al ili ankaŭ la vidkartojn kaj leterojn, kiujn mi estis skribinta por parencoj kaj amikoj, kaj finfine restis al mi kelkaj kronoj.

Revenante al la stacidomo, mi rigardis la vilaĝon. Ĝi ne estas granda kaj la ĉefa vidindaĵo estas baroka preĝejo, antaŭ kiu staras kolono. Mi supozas ke, same kiel en Vieno aŭ en Bratislava, ankaŭ la kolono de Lethorad estis konstruata post pesto, por peti de la sanktuloj, ke venontfoje



ili pli efike gardu la kristanaron. Verdire, mi tiom ŝatas la barokan stilon ke, se mi estus mikrobo, la vido de tiaj kolonoj certe fuĝigus min. Mi volis viziti la preĝejon, sed bruis la sonoriloj, mi ne scias kial, sed mi ne volis ĝeni la preĝantojn, kaj mi reiris al la stacidomo. La багаĝisto redonis al mi la valizon, kaj mi konstatis, ke tio kostas ekzakte tiom, kiom nefunkcia fako.

Mi alvenis do al Lichkov, kaj konstatis, ke tio estas tute malgranda vilaĝo perdita en la montoj sudetaĵ. La nura apartaĵo de tiu vilaĝo estas, ke ĝi estas la lasta antaŭ la ŝtatlimo ĉeĥa-pola. Mi petis de la biletisto bileton al Klodzko, li respondis ion, kion mi ne komprenis, kaj la purigistino klarigis al mi en germana lingvo, ke la fervojisto finos sian deĵoron post 10 minutoj kaj tial preferas, ke pri mia bileto zorgu la kolego. Mi iris al la atendejo. Ĝi estas tute malgranda kaj ĝin ornamas portreto de Gustav Husak. Tenistabla ne estis, estis skribotabla, sed ĝi estis okupita de kvar junaj slavoj. Dum unu horo mi silente observis la junulojn, kiuj unue ludis per kartoj, kaj poste provis dormi. Post la horo, mi iris al la giĉeto por peti bileton, la fervojisto respondis ion nekomprenblan, kaj fermis la giĉeton sen doni al mi bileton. Ĉar restis pluraj horoj antaŭ la trajno al Pollando, mi filozofie konsideris, ke verŝajne la ĉeĥoj ne intencas lasi min sidi en la stacidomo de Lichkov tiom longe, kiom daŭros la poreterna amikeco mongola-soveta, tial mi residis kaj provis interesiĝi pri la libroj, kiujn mi prenis en la policejo de Bratislava. Poste, ĉar la junuloj tute forlasis la tablon, mi daŭrigis leteron al korespondanto mallibera en Elzaco. Kelkajn minutojn antaŭ la deka horo, mi diris al la junuloj en germana lingvo, ke mi deziras bileton al Klodzko. Ili ne respondis, sed frapis al la giĉeto, parolis slave al la biletisto, kaj, ho miraklo, mi ricevis bileton al Klodzko. Ĉar ne eblas pagi internacian bileton per ĉeĥa-slovakaj kronoj, mi preparis mian francan pasporton kaj francajn frankojn. Sed la fervojisto montris al mi la parton de la bileto, kie estis skribite, ke la bileto kostas 17 kronojn. Reziĝante kompreni, mi pagis, kaj residis.

Jakelino.

(daŭrigota ; eble venontfoje Jakelino sukcesos transpasi la landlimon ?)

## S.A.T.-BROŜURSERVO

SAT-broŝurservo estis tute taŭge reprezentita en la ĉi-jara SAT-kongreso en RIJEKA, fare de Nicole, Ginette kaj Suzanne, kiuj prizorgis la broŝurtablon. En la UEA-kongreso en STOKHOLMO, kvankam la tiea librovendejo mendis stoketon da diversaj SAT-broŝuroj, la disvendado estis ridinde eta. Ĉu pro tro postulema, alimotivita klientaro ? Ĉu pro apud-eco de amaso da luksegaj eldonaĵoj ?...

Restinte hejme, la broŝurulo profitis sian feriperiodon plu eldonante kaj reeldonante :

\* Memvola Servuto (reldono kun frontpaĝo ilustrita de S. Sire)

\* La Kvina Evangelio, Han Riner, reldono (KE. 12FF)

\* Eduko kaj vivsignifo, Krishnamurti, reldono ĉi-foje en A5-formato (EV. 4FF)

\* El Verkoj de Leo Tolstoj, novaĵo 76-paĝa (VT. 6FF)

Tiu broŝuro konsistas el kvar tekstoj jam aperintaj :

- "Patriotismo kaj registaro, Al Politikistoj" estas represitaj el "Tri Verkoj de Leo Tolstoj", unua broŝuro eldonita de SAT, 1921.

- "Hodinka" estas ĉerpita el samtitola broŝuro eldonita de SAT, 1929.

- "Ne mortigu!" jam aperis, 1974, en la kadro de la broŝurservo.

\* Esperanto en 24 paginas (500 novaj ekzempleroj)

\* Esperanto or English? (330 novaj ekzempleroj)

\* Uf !

Malgraŭ tiu intensa laborado, vole-nevole la broŝurulo devas rezigni. Li ne plu povas ĉion fari, devas rifuzi manuskriptojn, peti helpon por kontroli la jam alvenintajn, por traduki, por surloke faldadi foliojn, ktp... La samtempa kreskado de "Laŭte!", kies estonteco estas pli kaj pli ligita al tiu de la broŝurservo, trudas situacion, el kiu momente ne estas elirejo.

Mi plu pardonpetas : Multaj geamikoj ne ricevos respondon al siaj leteroj, sugestoj ne povos efektiviĝi, sen la konkreta helpo de kelkaj frenezul(in)oj, kiuj konsentos kunlabori.

Nuna projekto sur la labortablo :

"Inter Sovetaj Popoloj" (1939-1946), originala verko de kdo Petro DIKSZTEIN. Pli ol 350 paĝoj.

Helpas por kontroli la manuskripton kĉoj Valo kaj ROL. La broŝurabonantoj aŭtomate ricevos tiun verkon (se ilia broŝurkonto estas sufiĉe provizita, kompreneble). Neabonantoj, kiuj deziras antaŭmendi ĝin, bonvolu pagi 16FF al la poŝtkonto de la broŝurservo : La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut, 3 374 04 M, Bordeaux. La prezo entenas la afrankon.

Atentu ! Post la 31a de decembro 1980 la vendprezo estos 20FF. Krome, la poŝtkonto de la broŝurservo tre verŝajne estos ŝanĝita. La nova, tre verŝajne, estos tiu, kiu jam utilas por "Laŭte!", nome :

Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 Laroque, pĉk: 3 371 74 M Bordeaux.

(Tiu ĉi modifo estos siatempe diskonigata al ĉiuj per "Laŭte" kaj aliaj gazetoj).

Kribo.

## VIVO DE "LAŬTE!"

La prizorganto estas supersŭtita. Sed la gazeto mem bonfartas. 279 abonoj en 1980. (232 en 1979).

Responde al demando de nia peranto en Britio :

La abonkotizo al "Laŭte!" por 1981 restos neŝanĝita, t.e. 15 FF (12FF por Francio) aŭ ekvivalento.

La kvar unuaj ĉen-leteroj liveris sufiĉe da materialo por vivantigi la bultenon dum tuta jaro. Du enkondukoj pri novaj temoj samtempe jam alvenis. Bonege ! Sed estus bone ankaŭ, se iom renoviĝos la partoprenantaro! Kiuj novul(in)oj deziras partopreni, eĉ se nur kelkajn debatojn, bonvolu skribi al "Laŭte!".

\*\*\*\*\*  
\*  
\* La venonta numero aperos meze de oktobro \*  
\*  
\*\*\*\*\*

## NIA FELIETONO

Antaŭ 50 jaroj... TRA LA MONDO  
PER BICIKLO kaj  
ESPERANTO

... La transsiberia fervojo estas dutraka. Mi bicikladis sur la dekstra trako kaj ne riskis kolizion. Por la postvenantaj trajnoj sur ununura trako mi havis la laŭregulan ruĝan signalon de la profesiaj voĵuzantoj. Kiam la vojo fariĝis unutraka, en iuj regionoj de Manĉurio, nu... la legantaro vidos poste. Mi aldonu, ke 80 % el la vojo estas tute rekta kaj ebena kiel bilardo.

Sabaton 6an de julio 1929 Hieraŭ je la 6a mi forlasis MOJGA kaj plu daŭrigis la bicikladon meze de arbaroj kaj sablo, en regiono simila al "Landes" en Francio. Kuloj, ĉiam kuloj, estas la ĉefaj kruelaj bestoj de tiuj arbaroj kaj koto la ĉefa malamiko sur la tervojoj.

Tiun nokton, aparta alarmo : unuafoje mi spertis malfacilecon trovi tranoktejon. En la ununura "isba", kie mi haltas, oni montras malemon gastigi min, eĉ kontraŭ pago. Mi devus alarmiĝi, sed mi estas tiel lacega, ke mi ja devas tranokti tie. Apenaŭ elkuŝinte, mi estas ĉirkaŭatakata de aĉaj kuloj. Ne plu povante elteni, je la unua matene mi ekstaras kaj esploras la lokon. La domo estas infestita de milionoj da cimoj kaj pedikoj. Ja la unuan fojon mi estas ties viktimo kaj mi nun komprenas, kial oni ne volis gastigi min : pro honto. Tuj mi kolektas miajn aferojn kaj foriras...

(...) Iom post iom malaperas la ebenaĵo kaj mi atingas la unuajn montojn de Uralo, kun iliaj rondformaj suproj kovritaj de abioj. La vetero estas belega. Je la 13a mi atingas la stacion KRASNOFINSK. Post la kutimaj formalajoj mi iras en la urbon. La magazenoj estas malfermitaj, sed la stratoj estas senhomaj, tial fiaskas la disvendado de miaj kartoj. Tamen mi renkontas du esperantistojn, kiuj invitas min siahejmen. Ni tuj iras nin bani en la rivero, kiu trafluas la urbeton. Tiu valo estas rave bela. Ĉirkaŭita de relative malaltaj montaroj abi-kovritaj, la rivereto kviete fluigas sian verdan kaj klaregan akvon. Tie ĉi ĉiuj, viroj kaj

virinoj, sin banas tute nudaj, sen kalsoneto, sen mamzono. Tio estas laŭmoda, kaj ŝajnas nek ridinda nek kritikinda.

Merkredon 10an de julio 1929. Iom post iom mi grimpadas kaj atingas la koron mem de Uralo. Kiel bela lando ! La vilaĝoj estas malproksimaj unu de la alia kaj la temperaturo malaltiĝis kompare al la ebenaĵo. En la stratoj de tiuj vilaĝoj svarmas ĉiuspecaj bestoj : kokinoj, porkoj, bovinoj, sed neniu homo ! Atingante unu el tiuj vilaĝoj, mi apenaŭ evitas la korpojn de multaj geviroj kuŝantaj ebriegaj sur la vojo. Ĉu festotago ? Jen la fakto. Estas samtempe naŭze vidi tutan vilaĝanaron kvazaŭ mortebria kaj reĝoĝige vidi ĉiujn domojn malfermitaj, kaj neniun ŝtelon, neniun seksperforton.

Vendredon 12an de julio 1929. Hodiaŭ, lasta etapo antaŭ SVERDLOVSK, t.e. 40-50 kilometroj. Jam de tre malproksime ĉirkaŭ la 16a, mi ekvidas la urbon . De tie ĉi ĝi similas vastegan vilaĝon grimantan sur la monteton elstarantan el la verda fono de la densa arbaro. Ĉe la supro la stratoj estas longegaj. Ĉiuj similas bulvarojn ; ili estas polvoplenaj kaj senhomaj. La tuta estas vastega konstru- aŭ rekonstru-kampo, ĉar la urbo multe suferis dum la revolucio. Tie en Sverdlovsk (antaŭe EKATERINBURG) estis mortpafita la cara familio.

Neniam antaŭe, eĉ en Moskvo kaj Stalingrado, mi rimarkis tion da entreprenitaj konstruadoj. Ĉio konstruiĝas samtempe : kloaka reto, tramlinioj, uzinoj kaj familiaj domoj, kio parte estas la kialo de tiu polvo swebanta super la urbo.

Mardon 16an de julio 1929. Tri tagoj da seninterrompa festa ĝojego stampis tiun ege popularan datrevenon de la liberiĝo de Uralo el la blankaj trupoj de generalo KOLĈAK. Ĉie estis muziko kaj popolbaloj sub rimarkinde hela ĉielo.

Mi vizitis la muzeon de la revolucio, instalitan en la historia domo, kie la lasta caro Nikolao la IIa kaj ties familio estis ekzekutitaj. Granda murpentraĵo prezentas la ĉefajn epizodojn. (...)

ALFA-BETA  
(daŭrigota)

Oni serĉas tradukonton...

\*\*\*\*\*

Oni serĉas tradukonton (preferinde liberecanan) por traduki maldikan sed densan broŝuron - 11 presitaj paĝoj en formato 16x24 - "Nia individuismo, ĝiaj postuloj, ĝiaj tezoj" de Emile ARMAND, celante la eldonon de tiu broŝuro en la kadro de SAT-broŝurservo por konigi la ideojn de tiu tendenco de la liberecana penso, kies tezoj konservas ankoraŭ nun sian aktualecon. Mi tutkore dankas la eventualan bonvolemlulon ! Skribi al : Jacques GREGOIRE, 32 rue Paul Dumas  
F 24000 PERIGUEUX.

La registrolibro de la internacia liberecana gazetaro  
\*\*\*\*\*

liveras la adresojn de la nun aperantaj liberecanaj gazetoj el la tuta mondo : 61 el Francio, 51 el Okcidenta Germanio, 50 el Italio, 25 el Hispanio, 16 el Portugalio, 33 el Britio, 9 el Svisio, 1 el Aŭstrio, 36 el Usono, 9 el Kanado, 9 el Svedio-Norvegio, 3 el Japanio, 5 el Aŭstralio, 2 el Meksikio, 2 el Venezuelo, 3 el Argentino, 8 el Danio, 7 el Nederlando, 1 el Nov-Zelando, 1 el Hindio, 1 el Izraelio, 1 el Hongkongo, 3 en esperanto... kaj ankaŭ la gazetaro el la hispanaj, portugalaj, bulgaraj, kubanaj, urugvajaj, grekaj elmigrintoj.

Oni povas peti informojn pri tiu dokumento al :  
C.P.C.A., BP. 21, F 94190 VILLENEUVE SAINT GEORGES.  
Tiuĵ adresoj estas regule ĝisdatigataj. J.G.

Simpla rimarkigo : Mi partoprenis plurajn eksterlandajn E-  
\*\*\*\*\* kongresojn. Laŭ mia scio, neniam okazis tio, kio trafis min en Rijeka. Mi neniam imagus, ke kongresano, forlasinte siajn pakaĵojn (volonte aŭ ne) en la kongresejo, retrovus ilin en policejo ! La tutan matenon oni petis min pacienciĝi. Tagmeze, mi mem klopodu por havigi ilin al mi. Bonŝance, sindona kdo faciligis al mi tian klopodon. Neatendita malagrabraĵo okazis : la policistoj malfermis mian valizon, difektinte ĝian seruron. Bonŝance, mi havis du rimenojn; tamen, ĉe la fino de la vojaĝo, ĝi pli kaj pli malfermiĝis. Miaj pakaĵoj havis la adresojn kaj LKK-anoj sciis kial ili estis en la kongresejo; plie, ili konis min persone. Mi tute ne kulpas pri la tuta afero, mi povus argumenti pri tio.(...) Mi sciigas tion nur por ke estontaj OKK-anoj zorgu, ke simila fakto ne plu okazu. S.Calas.  
Directeur de publication: Simonet. Imprimeur: Baudé, 47340 Laroque



# E-VIVO

STRASBURGO

\*\*\*\*\*

## Jara agadraporto pri la E-Grupo de Strasburgo-Neudorf

La E-grupo estas fako de la kvartala asocio "Association des Résidents et Amis du Neudorf". Por la ĝenerala asembleo de tiu asocio ĝi verkis agadraporton, kiu, kune kun la aliaj agadraportoj de la diversaj fakoj de la asocio, estis prezentita al la municipo de Strasburgo. Jen :

Se oni kunkalkulas la okazajn vizitintojn, partoprenis en la aktivadoj de la Esperanto-grupo, inter oktobro 1979 kaj aprilo 1980, 14 personoj, inter kiuj : 8 gefrancoj (inter kiuj 5 dialektoparolantaj geelzacanoj), 4 gegermanoj, 1 katalunino, 1 polo; 11 personoj scipovantaj la francan, 8 personoj scipovantaj la germanan.

Pro tiu situacio Esperanto estis la nura uzata lingvo, sed tio eble forpuŝis komencantojn.

### La sukcesoj

Escepte en februaro, ni sukcesis gardi periodecon de unu kunveno ĉiumonate. La kunvenoj estis jenaj :

oktobro : la kampanjo de Amnestio Internacia pri la soldatservrifuzantoj en Okcidenta Eŭropo, kun J. Lépeix, membro de Amnestio Internacia, kaj R. Girard, civilservanta obĵetanto.  
novembro : niaj aktivadoj, kaj niaj rilatoj kun la aliaj E-grupoj de la regiono, kun E. Ludwig, kiu instruas Esperanton en la liceo de Munster (Elzaco).

decembro : hejmaj orkideoj, lumbildprelego, kun A. Schärger.

decembro : L.L.Zamenhof, kreinto de Esperanto, kaj lia kultura medio, kun W. Zelazny, de Rzeszow (Polio).

januaro : Katalunio, mia lando, kun Montserrat Cañellas.

marto : atomcentraloj : lumbildoj de R. Schnell, Karlsruhe, membro de Ekologia Rondo Esperantista ; prezento de la broŝuro pri Fessenheim kaj Wyhl fare de ĝia esperantigentino.

aprilo : lernado de fremdlingvoj, kun A. Schärger, instruanto de angla lingvo en Kehl.

### La malsukcesoj

La kurso por komencantoj ne estis starigita, ĉar neniu prezentigis. Ni klarigas tiun faktan per la ekzisto en nia

regiono de bona perkoresponda kurso. La kurso por progresantoj ne povis komenciĝi ĝustatempe pro malsano de la gvidontino, kaj poste estis tro malfrue, kaj ni rezignis pri ĝi por la jaro.

### La projektoj

Ni atendas baldaŭan viziton de esperantistoj el Orienta Eŭropo, kaj organizos specialajn kunvenojn por ilin akcepti. Tiuj kunvenoj estos la lastaj por la nuna lerneja jaro, ĉar multaj el ni ne estos disponeblaj en junio.

Por la lerneja jaro 1980/81 ni antaŭvidas :

- gardon de la periodeco de unu kluba kunveno ĉiumonate. La temoj estos komune elektataj de la grupanoj.
- kreadon de kurso por progresantoj, t.e. personoj, kiuj havas elementan konon de Esperanto, sed ankoraŭ ne kapablas partopreni en kluba kunveno. Tiu kurso aperas kiel neceso, se oni ne volas ilin perdi. Male, kurso por tutaj komencantoj estos kreata nur, se oni ĝin petas de ni.

(Raporto originale verkita en franca lingvo kaj e-igita de J. Lépeix.)

### PIKNIKO en VAŬKLULO (22/06/80)

\*\*\*\*\*

Majstre organizita de la Karpentrasa Grupo - eĉ ne mankis la fama ĝigondasa vino de nia amiko Petro! - la pikniko ĝuis sufiĉe bonan veteron.

Je la 9a kaj duono pli ol 40 amikoj ariĝis antaŭ la romania preĝejo de la urbeto LE THOR. Marguerite Reynaud donis interesajn klarigojn pri tiu monumento.

La aŭta karavano forlasis LE THOR kaj atingis la groton de THOUZON. Verŝajne neniu enuis dum la vizito. Ĉiu vizitinto nun bone scias, ke unukilograma stalaktito pezas mil gramojn!

Post la vizito, malgraŭ la granda aŭta trafiko en tiu dimanĉo, neniu perdiĝis, kaj pli ol 60 verduloj ĉetabliĝis en la ripoziga "Partage des Eaux" en ISLE SUR SORGUE. Kelkaj nevaŭkluzanoj profitis la neoficialan kunvenon de la Vaŭkluzo Federacio por viziti FONTAINE DE VAUCLUSE. Aliaj restis. André Gente prezentis la restadon en SETE. Ĝi okazos ĵus antaŭ la fervojista renkontiĝo en VAISON

LA ROMAINE. Pri tiu lasta, detale parolis Roger Motto. Jam pli ol 20 eksterlandanoj ! Mankos loko. Madeleine Gibeze parolis pri la ĝemeligo de la urbo CREST kun urboj de Germanio kaj Anglio. La oficialaj festos okazos la 21an kaj la 22an de septembro.

### 1) Agado en la pasinta jaro :

- a) Federacio : Okazis du sesioj (decembro kaj junio), kiuj ebligis trapasi la du unuajn ekzamenojn de F.E.I. La trimonata ligilo "VAUCLUSE-ESPERANTO" preskaŭ regule aperis. La Federacio ne obtenis subvencion de la Departementa Konsilantaro.
- b) Grupoj : en KARPENTRASO, Revest estos registrita en la telefonlibro kiel profesoro pri Esperanto. Kontentige funkciis la kurso kaj la kunvenoj. En AVINJONO, Gente kaj Humm estos registritaj en la telefonlibro. Du kursoj estis en Kulturdomo, ankaŭ perkoresponda kurso por izoluloj. Tri gravaj eventoj okazis en la jaro : la Zamenhofa Tago en Barbière (78 partoprenintoj), la biblioteko havas nun pli ol 100 librojn aŭ broŝurojn, la dekan de junio okazis prelego pri ISRAEL fare de Antoine Rispal, kiu eklernis la I.L. pasintan oktobron.

### 2) Voĉdono por la Federacia Konsilantaro

Jen la rezultoj de la "lotado" :

Administrantoj ĝis 1982 : DELORME Jane, GENTE André, NICOLAS Michel. Ĝis 1983 : GENTE Hélène, MOTTO Roger, REVEST Samuel. Ĝis 1984 : ARNAUD Eline, DELAYE André, DUCELLIER Suzanne.

### 3) Venonta agado

- a) Federacio : Perfektiga kunlabora kurso okazos en Avinjono dufoje en la monato, ĵaŭde, de la 18a ĝis la 19<sup>a</sup>. Enskribiĝis : 11 personoj. Kompreneble aliaj povos partopreni en tiu kurso.
- b) En la Grupoj : Post la fervojista semajno en VAISON, Eline Arnaud klopodos malfermi kurson en tiu urbo. Ni helpos ŝin kiel eble plej. En Karpentraso la grupo jam varbis novajn lernantojn. En Avinjono oni provos starigi semajnfinojn en Novembro. Okaze de la monataj renkontiĝoj oni planas malpli da diapozitivaj kaj pli da konversacio !

### 4) Diversaĵoj : Marcel JULLIEN raportis pri la agado en AIX

#### IV

kaj Clarisse MOUNIER pri la forpaso de Roger VOLPELIERE.  
Simone HUMM proponis kiel ejon por la Zamenhofa Tago 80  
"Calanque des Eaux Salées" en CARRY LE ROUET.

Entute estis kuraĝiga tago por ĉiuj partoprenantoj. Eble oni povas bedaŭri la tro rapidan disiĝon post la fino de la "oficiala" kunveno.

#### ĜIRONDIO

\*\*\*\*\*

Por nia junia kunveno ni estis 9 gekamaradoj por pikniki en Larrat. La malvarma vetero enirigis nin en la domon de Leo kaj Gaïta por tagmanĝi. Vigla kamenfajro plezurigis nin kaj ĉe la table, manĝante, ni babiladis jen france jen esperante. Post la manĝo ni piediris tra la apuda kamparo. Reveninte al la domo, ni kunvenis kaj faris projektojn por la estonteco de nia agado.

En septembro : ni retrovos nin en CENON-Palmer, mardon la 16an, je la 19a horo.

En oktobro : sabaton la 11an je la 15a horo en BONNETAN ĉe ge-COURBIN. Tiuj, kiuj deziros alveni pli frue, estos akceptitaj, kun tagmanĝo en la sako ! Joël

#### INTERNACIA RENKONTIĜO DE JUNAJ ESPERANTISTOJ

Ĝi okazos sabaton la 11an kaj dimanĉon la 12an de oktobro, en antaŭurbo de BORDOZO, en Francio.

Ni disponos grandan parkon kaj vastajn ĉambrojn por amikiĝi, interparoli, kanti, ktp...laŭ la deziroj de la partoprenantoj, sen antaŭfiksita programo. Eblos tendumi kaj komune manĝi surloke.

La organizantoj petas la interesatojn anonci sin frue, ĝis fino de septembro, skribante al :

Michel BAURET, 17 rue Utrillo,

F 33140 VILLENAVE D ORNON - Francio

Ili ricevos pli da precizigoj tuj poste...

LOT-GARONIO (Esperanto-Rondo Aĝenia)  
\*\*\*\*\*

+ vd.p.VIII !  
GRAVE !

Sep AERA-an(in)oj kunvenis en CLAIRAC la 21an de junio. Tio estis nia "ĝenerala asembleo" !

Konstatoj : Kursoj okazis en Monflanquin, Tonneins, Clairac kaj Villeneuve sur Lot (po 3 aŭ 4 galemanoj). La perspektivoj por la venonta jaro ne estas optimismo-donaj.

Decidoj : J.C.Gionco fariĝas ano de la grupkomitato. Preparado de paneloj por ekspozicioj (ni ĉerpos inspiron el tiuj jam desegnitaj de Ginette por la najbaraj grupoj).

Venonta kunveno de A.E.R.A. :

Sabaton 27an de septembro, 14h30, en la stacidomo de LAROQUE TIMBAUT.

Tiam ni decidis pri tio farota en la nova lernjaro. Samtempe ni faldados por la broŝurservo...

ANONCETO : Diversaĝaj, diversprofesiaj esperantistoj el Litovio serĉas leteramikojn tra la tuta mondo. Respondo certas. Adresojn peras : Laimundas Abromas, 234432 pŝt PILIS, Jurbarko raj. Litova SSR - USSR. Adreso de peranto ĉiam validas.

#### HISPANIO

\*\*\*\*\*

Okaze de E-ekspozicio la E-grupo de Madrido aperis 10 minutojn ĉe la nacia televido hispana. Ĉar tio okazis dum la manĝ-horo, milionoj da personoj povis tion vidi.

Pri la diversaj SAT-revuoj kaj "Esperanto en 24 paĝinas" aperis anoncoj en diversaj ekologiaj revuoj, "Integral Mundo desconcido", "Historia y Vida", ktp.

Kiu povas donaci al la Esperanto-Muzeo en Sant Pau de Ordal jenajn numerojn de "Laŭte!" : 3,7,8,16,19,20,25, 29,32,36,38,39,40,41,42 ? Tiu skribu al : Hispana E-Muzeo Str. Dro Zamenhof 12, SANT PAU D'ORDAL (Barcelona).

Por viziti tiun muzeon : ekde Barcelono uzi trajnon ĝis la stacio LAVERN SUBIRATS. Poste, 2-kilometra promenado ĝis Sant Pau de Ordal. Prefere ekrilatu kun barcelona esperantisto antaŭe.



Noto de Laŭte-red. : Por ĉiu numero de nia bulteno la tuta eldonita kvanto estas dissendata. Ne eblas do poste peti antaŭajn numerojn. Ni pardonpetas al la kolektemuloj, kiuj ne povis de la komenco aboni al "Laŭte!". Krome, ni sendas kiel eble plej malmulte da senpagaj ekzempleroj, ĉar fakte tiuj ekzempleroj estus pagitaj de la abonantoj. Ni prefere plu tenu kiel eble plej malaltan abonprezon, ol malŝpari por ofte superflua aŭ vana varbprovado.

---

INTERNACIA FERIOSEMAJNO DE T.A.N.E.F. en OBERKIRCH :  
 \*\*\*\*\*

la suno brilis en ĉies koroj.

La internacian feriosemajnon de TANEF partoprenis 28 gesperantistoj el Nederlando, Svedio, Berlino, Svisio, Franca Respubliko kaj FR Germanio. Bedaŭrinde, kelkaj povis partopreni nur parte, pro profesiaj aŭ aliaj devoj. La semajnfino komenciĝis vendredon 11an de julio per interkonatiĝa vespero. Sabaton matene, la partoprenantoj kolektiĝis en la centro de la urbo, apud la leonputo. La puto estas malgranda, kaj ŝtona leono staras apogante kruron sur la ŝildo de la episkopoj de Strasburgo, kiuj iam regis urbeton Oberkirch. Oni piediris en la urbo, kaj kdo Poppeck fotis la grupon en la Esperanto-strato, zorge evitante meti sur la foton ankaŭ kanonon de la franca armeo. Ĉar la Esperanto-strato de Oberkirch estas sufiĉe longa, troviĝas sur ĝi, krom francaj armeanoj, ankaŭ germanaj civiluloj, bedaŭrinde neniu estas esp-isto. Tamen ĝi estas internacia strato. Posttagmeze la kuraĝuloj kuniĝis sub la pluvo ĉe hotelo "Supra Tilio", bela konstruaĵo de la 17a jarcento, en la tipa stilo de la regiono. La programo antaŭvidis promenadon tra la vitejoj. La veteristoj prognozis pluvon. Oni promenadis tra vitejoj sub pluvo. Atinginte monteton, oni resekiĝis kaj kukmanĝis en restoracio "Domo ĉe Monto". Por la vespero la programo antaŭvidis partoprenon en la loka kastelfesto. Bedaŭrinde, pro pluvado dum la tempo, kiam la festo devus esti preparata, ĝi estis nuligita de la organizantoj. Sub senpluva ĉielo, la feriantoj tamen iris al kastelo Schauenburg por de tie ĝui belan pejzaĝon. Poste, ĉar la malplimulto jam mendis en la gastejo ĉe la

kastelo, la subpremata plimulto devis sekvi. En la gastejo sinjorinoj postulis de Poppeck, ke li purigu iliajn ŝuojn suferintajn pro la trairado de malsekaj vitejoj. Ĉar k-ino Poppeck estas tro servema edzino, k-do Poppeck ne kutimas purigi ŝuojn. Li argumentis, ke la herbo de la vitejoj repurigis la ŝuojn post irado sur malsekaj teroj. Ĉar la konflikto ne okazis interne de SAT, k-do Persson ĝin ne arbitraciis. Finfine oni konkludis, ke ja laŭprograme plenumiĝis la punkto "promenado tra vitejoj". La diskuto ĝojigis la etoson, kaj la vespero plu daŭris per rakontado de humuraĵoj. La senluma malgrimpado finiĝis post la nokto-mezo.

Dimanĉon posttagmeze la postvivantoj grupiĝis ĉe hotelo "Supra Tilio". Okazis demokrata referendumo, ĉu oni respektu la pro la stato de la teroj tute ne respekteman programon. Estis akceptitaj du kontraŭproponoj : la sekemuloj manĝis kukojn en Oberkirch, dum la pluvamiko piediris al vilaĝo Laŭtenbach per la apudrivera vojo. Germana promenanto miris, ke promenas ĉe rivero Rensch tiom da homoj tiom frenezaj, kiom li mem. Tamen vidiĝis eĉ fiŝkaptontoj. Post du-kilometra migreto, la grupeto atingis en Laŭtenbach preĝejon "Kronado de Maria". En tiu pilgrimejo troviĝas altarbildo de Mathias Grünwald, sed malpli famaj ol la issenheima altartabulo videbla en la muzeo de Kolmaro en Elzaco. La grupo resekiĝis en kukejo, kaj revenis sub la pluvo per la sama vojo. Vespere okazis alia amika kunestado en gastejo "Supra Tilio".

Lundon posttagmeze, kelkaj gepartoprenantoj rimarkis kun ĝojo, ke la publika barometro mencias nekonstantan veteron. Ĉar nur pluvetis, kelkaj povis pikniki sur la publika placo fronte al hotelo "Supra Tilio". Lucien kaj Lilli Giloteaux montris al la grupo la pluvmantelojn, per kiuj la turismejo rekompencis la turistojn, kiuj kuraĝis resti almenaŭ 3 tagojn en la urbo, por ke ili poste rememoru la etoson spertitan en Oberkirch. Tamen ili ne bezonis ilin uzi dum la lunda posttagmezo, ĉar la suno tiam brilis ankaŭ ekster la koroj.

La aŭtobuso veturis sur bela montara vojo tra la Nigra Arbaro, kaj la ekskursantoj atingis urbeton Wolfach. Ili vizitis uzinon Dorothenhütte, kie vitro estas metie fabrikata per buŝa blovado, kaj ili povis observi la laboristojn

## VIII

dum la diversaj etapoj de la fabrikado de glasoj. Ŝajne la laboro estas peniga, ĉar la blovisto suferas pro la proksimeco de infereca fajro, kaj la cizelistoj pro la neceso resti dum tuta labortago en la sama korpa pozicio. Tamen la laboristoj povas fieri, ke ili estas kreantoj de belaj artaĵoj. Poste la ekskursantoj vizitis sub daŭra suno subĉielan muzeon de tipaj kamparaj domoj de la Nigra Arbaro, el ligno. Post la vizito de tiu interesa kaj agrabla loko, la ekskursantoj kukmanĝis en la tipa restoracio apud la muzeo.

Mardon matene, migrado al Hirundoŝtono donis al la dankemaj ricevintoj taŭgan okazon por testi la sagacajn donacojn de la oberkircha turismejo. Posttagmeze la postvivantoj iris al kafejo Gmeiner por rigardi, kiel oni fabrikas la nigrarbaran ĉeriztorton. Ĝi estas sufiĉe dika germana kuko kun kremo, ĉokolado kaj ĉerizoj. Kompreneble, post rigardado venis gustumado. La kuna vesperado okazis en gastejo "Plugilo".

Merkredon posttagmeze, la feriantoj iris viziti la sufiĉe modernajn instalaĵojn de loka gazeto kaj tiel, krom interesa informiĝo, propagandis Esperanton al Rench-valanoj. La adiaŭa vespero okazis en gastejo "Pavo", ĉar ĵaŭdon kelkaj el la partoprenintoj volis iri al la kongreso de SAT en Rijeka.

Raportis Jacqueline.

---

Aĝenia E-Rondo (lastmomentaj informo kaj alvoko)

\*\*\*\*\*

Ĝus alvenis la informo, ke nia amiko Jako SIMONET, pro personaj, profesiaj, motivoj, devas ekŝiĝi. Nia grupo, jam tre malvigla, devas fronti tiun baton, nepre trovante novajn bonvolemul(in)ojn por

- leĝe respondeci pri "Laŭte", zorgi pri la AERA-kaso kaj la libroservo de la grupo.

Samtempe estas minacataj la Aĝenia grupo, "Laŭte" kaj SAT-broŝurservo, ĉar ne eblas, ke ĉiuj tri aferoj estu funkciigataj de ununura persono !

Do, la EKSTERORDINARA KUNVENO DE A.E.R.A. en Laroque-Timbaut (stacidomo) la 27an de septembro (je la 14a30) decidis pri la pluvivo (aŭ morto) de nia grupo kaj de ties aktivecoj.

Kribo